

Iste confessor

Brevier-Himno

Propraj tekstoj laŭ la kalendaro > la 11-an de novembro > Sankta Marteno el Tours > horo de la legaĵoj
Propraj tekstoj laŭ la kalendaro > la 11-an de novembro > Sankta Marteno el Tours > vespera laŭdo

*Iste confessor Domini sacratus,
festa plebs cuius celebrat per orbem,
hodie lætus meruit secreta
scandere cæli.*

*Qui pius, prudens, humilis, pudicus,
sobrius, castus fuit et quietus,
vita dum præsens vegetavit eius
corporis artus.*

*Ad sacrum cuius tumulum frequenter
membra languentum modo sanitati,
quolibet morbo fuerint gravati,
restituuntur.*

*Unde nunc noster chorus in honorem
ipsius, hymnum canit hunc libenter,
ut piis eius meritis iuvemur
omne per ævum.*

*Sit salus illi, decus atque virtus,
qui supra cæli residet cacumen,
totius mundi machinam gubernat
trinus et unus.*

Amen.

latina T: nekonata verkinto, 8-a jarcento

Ĉi konfesoru sankta de l' Sinjoro,
kies solenon festas ĉiu mondo,
ĝoje hodiaŭ iris al misteraj
altoj ĉielaj.

Dum sia vivo en surtera korpo
li estis pia, saĝa kaj modesta.
Sobra li estis, ĉasta kaj kvieta,
ĉiam helpema.

Post lia morto ofte malsanuloj,
kiuj diversa-spece suferadas,
preĝas kun fido apud lia tombo,
trovas saniĝon.

Tial ni ĥore nun ĉi himnon kantas,
por lin honori, por ke li nin helpu,
ke ankaŭ ni kun li eterne ĝuu
ĝojon ĉielan.

Estu la sav', la gloro kaj potenco
al la tronanta en ĉielaj altoj,
kiu direktas nian universon:
Di', la Tri-unu.

Amen.

E: Albrecht Kronenberger 2009